

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :

Box 731, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio). —

Abono (por dek du numeroj) :

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 48

Melburno (Melbourne), Australio.

10 junio 1924

ESPERANTO—THE INTERNATIONAL LANGUAGE.

Fifth Australasian Congress.

Melbourne, Easter, 1925.

June 1st, 1924.

Karaj Samideanoj,

Esperanto is slowly but surely becoming more widely known and used in commercial, social, political and religious life.

The fifth Australasian congress will take place in Melbourne during Easter, 1925.

All Esperantists remember, with pleasure and pride, the last congress in Sydney (1923).

Let us endeavour to make the fifth even better than the fourth.

With this aim in view we call on all samideanoj to assist the committee and executive.

You can do this by: 1. Sending early application for congress tickets; 2. Sending donations to the congress special fund; 3. Organizing entertainments and sending the proceeds to the congress secretary.

The subscriptions have been fixed as follows:—Melbourne members, £1/1/-; Country, Interstate, New Zealand, Papua and the Islands, 10/6. A reduction of 10 per cent. is allowed to families of two or more members.

We make a special appeal for immediate financial support, so that your executive officers may be guided by the subscriptions forthcoming.

The programme of business, excursions, entertainments, etc., must of course depend upon the financial support from you.

You can, and will, make the fifth a valuable means for publicity, but, let us remember that complete success depends upon our speedy financial support.

Send us your suggestions for the congress programme.

R. RAWSON, Hon. Secretary.

H. BYATT, Hon. Treasurer.

New Zealand Labour Party, in their Sixth Annual Conference, 1923, included in their Platform under heading 4 (Education) the following: "The universal language—Esperanto—to be included in the curriculum for all State Schools."

M. Heriot, Mayor of Lyons, and candidate for the Premiership of France, recently received Dr. Edmond Privat, Prof. Antonelli and M. Bobin, who urged upon him the claims of Esperanto. M. Heriot expressed himself to be fully in sympathy with the Esperanto Movement and its aim of facilitating direct relationship between the peoples of the world.

PROPAGANDAJ PAROLOJ.

Antaŭ la "Instituto de Reklamistoj" la 26-an de marto du fervoraj subtenantoj de Esperanto, sinjoroj Robert Jones, konata instruisto kaj J. G. Pyke, prezidinto de AEA, faris trafikajn parolojn pro Esperanto ĉe tagmeza kunveno, en Melburno. Bedaŭrinde la aŭdantaro ne estis granda. Kvaronkolonaj raportoj aperis en la taggazetoj, el kiuj ni tiras la jenon:

Mr. Jones said that it was a fallacy to suppose that in learning the world language of Esperanto one had to master the languages of the world. It was also a mistake to believe that Esperanto was an attempt to supplant any language. In learning Esperanto there were no pronunciation difficulties, no sound intricacies, and no trouble in regard to vocabulary or grammar. Of its convenience too much could not be said. This last attribute was apparent when one considered the inconvenience of speakers employing their native tongues at international assemblies, such as the Versailles conference. He (Mr. Jones) claimed that the sound of Esperanto was very beautiful, rivalled only by the melody of the liquid Italian language. So far as the grammar was concerned, every noun ended in "o," every adjective in "a," and every adverb in "e." Esperantists could increase their vocabularies by simple additions to a basic word. The founder of the tongue, M. Zamenhof, a Pole, spent his lifetime in endeavouring to find a way to make men understand each other, and thus to mitigate the horrors of war. Esperanto was the result of his labours. M. Zamenhof scorned material wealth; he performed his work for the benefit of mankind.

Mr. Pyke described the experiences of the Australian delegates when travelling to and from the Esperanto congress at Prague for propaganda purposes, and attended by 2,500 delegates from all parts of the world. Everywhere the Australians went they were most hospitably received. One of the great advantages of being an Esperantist was that one had the opportunity of entering the homes of all classes of people in all parts of the world, thereby gaining

an insight into their customs and ideas. Such an experience did not fall to the lot of the person who was ignorant of Esperanto. Thanks to the aid of Esperantists everywhere, the delegates at no time suffered any inconvenience at European borders in connection with passports or Customs. "The main use of Esperanto," concluded Mr. Pyke, "is to endeavour to make the world a better place."

REQUIESCAT.

By Rosamund Marriott Watson.

Profunde enterigu min—profunde,
En ŝtona tero, kiam mortos mi;
Tre malproksime de arboro pina;
Ke ne memoru mia polv' per ĝi.

Neniam plantu tie dolĉan floran—
Ne kresku violet' sub ombra pin';
Neniu birdo kantu al printempo,
Ke mia polvo ne eksentu ĝin!

Kaj vi!—ho, kie ajn vi tiam vagos—
Pli kara vi, ol floro, birdo, pin'—
Neniam—ho, neniam paŝu tie,
Ke mia polvo ne revadu vin!

Trad. M. R. Cederman, N.Z.

Internacia Unio de Radio-Amatoroj
—En Parizo je la 13a marto okazis internacia konferenco de naciaj amatoraj radio-societoj, por diskuti la fondon de internacia organizaĵo por la radio-amatoroj, kaj ankaŭ por konsideri la elekton de internacia unio "de Radio-Amatoroj," kaj elektis kiel Sekretarion, D-ro Pierre Corret. Dum la diskuto, la pretendoj de Esperanto estis konsiderataj. Oni fine decidis aranĝi internacian organizaĵon kaj ankaŭ elekti internacian lingvon.

Brodkastado.—Unu el la ĉefaj celoj de I.R.A. krom propagando inter amatoroj, estos propagando ĉe la diversaj brodkastaj stacioj. Jam en kelkaj landoj oni permesis paroladojn aŭ pri aŭ per Esperanto, kaj sendube en la estonteco, tiuj paroladoj multobliĝos.

La diversaj paroladoj kiuj okazis ĝis nun, estas pli-malpli kvazaŭ eksperimentoj de la brodkastaj stacioj. Ili kompreneble deziras scii ĉu multaj personoj efektive bezonas tiajn paroladojn, kaj ilia sola rimedo por eltrovi tion, estas ricevi de aŭdintoj

raportojn pri ricevo de la paroladoj. Oni do urĝe petas al ĉiu samideano kiu aŭdas esperantan paroladon de iu stacio, ke li tuj sendi poŝtkarton esperantan al la stacio koncernita. Per tio li faros bonan propagandon.

KELKAJ C'APITROJ EL "QUATRE VINGT-TREIZE"

De Victor Hugo.

(Daŭigo).

V

VIS ET VIR.

La kanono iris kaj venis sur la interferdeko. Oni dirus: la vivanta ĉaro de l' Apokalipso. La marlanto ŝanceliĝanta aldonis al tiu vizio rapidegan turniĝon de ombro kaj lumo. La formo de l' kanono malpreciziĝis pro la rapideco de ĝia kurado, kaj ĝi aperis aŭ nigra en la heleco aŭ reflektanta senkonturajn helaĵojn en la mullumo.

Ĝi daŭrigis la detruadon de la ŝipo. Ĝi estis jam frakasinta kvar aliajn kanonojn kaj en la pario fendinta du truojn, feliĉe super la floslinio, sed tra kiuj enversiĝos la akvo en okazo de ventego. Ĝi freneze rulis sur la planko; la tre fortikaj traboj rezistis, kurbaj lignaĵoj havas specialan solidecon; sed oni aŭdis ilian krakadon sub tiu neordinara klabo, frapanta, kun neaŭdita vicleco, ambaŭ flankojn samtempe. Plumba grajpo skuata en botelo ne kaŭzas pli rapidan kaj frenezan perkutadon. La kvar radoj pasis kaj repasis sur la mortigitaj homoj, ilin dividis, dispecigis kaj tranĉis, kaj el kvin kadasroj ĝi elfaris dudek stumpojn rulantajn sur la baterio; la senvivaj kapoj kvazaŭ kriadis, sangofluoj tordiĝis sur la planko laŭ balanciĝoj de l' ŝipo. La riparo, diversloke difektita, ekmalfermetiĝis. La tuta ŝipo estis plena de monstra bruoj.

La kapitano reprenis tuj sian malvarmon, kaj laŭ ordono lia oni jetis trans la krado-fenestro sur la interferdekon, ĉion kio povos mildigi kaj

malhelpi la senbridan kuradon de l' kanono, matracojn hamakojn, velojn, ŝnurorulojn, sakojn de la pasaĝeroj kaj ligaĵojn de falsaj asignatoj, de kiuj la korveto estis plene ŝarĝita. Sed por kio taŭgos tiuj ĉifonoj, se neniu kuraĝas malsupreniri por ilin konvene dismeti? Post kelke da minutoj ĝi estis jam ĉarpio.

La maro estis sufiĉe malkvieta, por ke la akcidento estu kiel eble plej kompleta. Ventego estus ja dezirinda; ĝi eble renversus la kanonon, kaj, kiam la kvar radoj estus levitaj, facile oni ĝin regus.

Dume la detruado pligraviĝis. El ŝeliĝoj kaj eĉ rompiĝoj trafis la mastojn, kiuj enpremataj en la ĉarpentaĵo de la kilo, trabojas la ŝipetaĵojn kaj aspektas kiel rondaj fostegoj. Pro la konvulsiaj frapoj de l' kanono, la antaŭa masto difektiĝis, la granda masto mem estis ekvundita. La baterio elartikiĝis. Dek kanonoj el trideko estis senuzigitaj; la breĉoj en la pario multobliĝis, kaj la akvo enversiĝis jam en la korveton.

La maljuna en la interferdekon malsuprenirinta pasaĝero ŝajnis ŝtona viro staranta sur la sojlo de l' ŝtuparo. Li turnis sur tiun ekstermendon severan alrigardon. Li neniom moviĝis. Neeble ŝajnis fari paŝon en la baterio.

Ĉiu movo de la kanono en libereco minacis enfundiĝi la ŝipon. Ankoraŭ kelke da momentoj kaj subakviĝo estos neevitebla.

Decis pereĵi aŭ ĉesigi tuj la malfeliĉon; preni decidon; sed kiun?

Kia batalisto tiu kanono!

Oni devis haltigi tiun teruran frenezulon.

Oni devis kvietigi tiun fulmotondron.

Boisberthelot diris al La Vieuville:

—Ĉu vi kredas al Dio, kavaliro?

La Vieuville respondis:

—Jes. Ne. Kelkafoje.

—Ĉu en la ŝtormo?

Jes. Kaj en momentoj kiel ĉi tiu

—Efektive, nur Dio povas ja nin elsavi,—diris Boisberthelot.

HALL'S BOOK STORE

264 CHAPEL STREET,
PRAHRAN

(Opposite Town Hall).

'Phone : Windsor 6081.

Books and Music bought at your home.

Libraries Valued.

Specialist in Secondhand School and College Books.

Secondhand Music.

Full Stock of Esperanto Books.

Agent for "LA SUDA KRUCO."

Ĉiuj silentis, lasante al la kanono fari sian teruran brudadon.

Ekstere, la ondoj frapantaj la ŝipon, respondis al frapoj de l' kanono, per marbatoj. Oni dirus du alternantaj marteloj.

Subite, en tiu speco de nealirebla cirko, kie saltegis la liberiĝinta kanono, oni vidis viron aperantan, kun fera vergo en mano. Li estis la aŭtoro de la katastrofo, la bateriestro kulpa de malzorgo kaj kaŭzo de la akcidento, la mastro de l' kanono. Farinte la malbonon, li volis ĝin rebonigi. Li prenis handspikan stangon per unu mano, per la alia droson kun glitanta knoto, kaj eksaltis trans la krado sur la interferdekon.

Tiam sovaĝaĵo komencis; titana spektaklo; lukto de l' kanono kontraŭ la kanonisto; la batalo de la materio kaj la inteligento, duelo de objekto kontraŭ homo.

La viro staris en angulo, kaj kun vergo kaj ŝnuro en ambaŭ siaj pugnoj, ŝirmata, firma sur siaj kruraj kvazaŭ paro da ŝtalfosto, pala, kvietaj, tragedia, kvazaŭ enradikita en la planko, li atendis.

Li atendis preterpason de la kanono.

La kanonisto konis sian paflegon, kaj al li ŝajnis, ke tiu devas lin koni ankaŭ. Li kun ĝi vivadis jam ĉe longe. Kiom da fojoj la manon li metis en ĝian faŭkon! Ĝi estis lia familia monstro. Li alparoli ĝin kiel sian hundon.—Venu,—diris li. Eble li amis ĝin.

Li ŝajnis deziri, ke ĝi venu al li.

Sed veni al li, tio estas veni sur lin. Kaj tiam li estos mortigata. Kiel eviti la premegon? Tie kulis la demando. Ĉiuj rigardis terurite. Eĉ ne unu brusto libere spiris, krom eble tiu de l' maljunulo, kiu sola staris en la interferdeko kun ambaŭ batalantoj, malfeliĉa atestanto.

Lin mem povis la kanono dispremi. Li neniom moviĝis.

Sub ili la ondaro, blinda, direktis la batalon.

En la momento kiam, akcentinte la timigan duelon, la kanonisto ekincitis la kanonon, pro hazardo de marbalanciĝo tiu restis momenton senmova kaj kvazaŭ miranta.—Venu, do!—al ĝi la homo diris. Ĝi ŝajnis aŭskulti.

Subite ĝi saltis sur lin. La viro evitis la frapon.

Lukto komencis. Lukto neniam aŭdita. La rompeblo sin puŝanta kontraŭ la nerompeblo. La karna estaĵo atakanta la bronzan bruton. Unuflanke forteco, aliflanke animo.

Ĉio ĉi okazis en duonombro. Ĝi estis kiel malpreciza vizio de mirindaĵo.

Stranga afero, oni dirus, ke la kanono havas ankaŭ animon; sed animon de malamo kaj furiozo. Tiu blinda kvazaŭ posedis okulojn. La monstro ŝajnis subobservi la homon. Ekzistis, almenaŭ oni tiel pensus, ruzo en tiu maso. Ĝi ankaŭ elektis sian momenton. Ĝi estis ia giganta fera insekto reale aŭ ŝajne posedanta diablan volon. En unu sekundo tiu kolosa akrido ektuŝis la malaltan plafonon de la baterio, poste ĝi refalis sur siajn kvar radojn kiel tigro sur siajn ungegojn kaj ekkuris denove sur la homon. Li vigla, facila, atentema, tordiĝis kiel kolubro je tiuj fulmorapidaj movoj. Li evitis la renkontojn, sed la frapoj de li evititaj falis sur la ŝipon kaj daŭrigis la detruadon.

Peco de rompita ĉeno restis alkraciĝinta al la kanono. Tiu ĉeno ruliĝis, oni ne scias kiel, ĉirkaŭ la pivota ŝraŭbo de l' postumo. Unu ekstremo de la ĉeno estis fiksita en la afusto. La alia, libera, turniĝis freneze ĉirkaŭ la kanono, kies bruigadon ĝi pligrandigis. La ŝraŭbo kiel ferma mano tenis ĝin kaj tiu ĉeno, aldonante al batoj de ŝafo batojn de rimeno, faris ĉirkaŭ la kanono teruran kirlon, fera skurĝo en bronza pugno. Tiu ĉeno komplikis la lukton.

Tamen la viro batalis. Eĉ, kelkfoje, estis la homo, kiu atakis la kanonon; li alrampis laŭlonge de la

THE - CHOCOLATE - BOWL

18 Centreway

Collins Street, Melbourne

'Phone 2210

Best quality Chocolates, Nougats, Fudges, Marshmallows, Candies,
4, 5 and 6 oz., 1/-.

Fancy Boxes, 10/- upwards.

Aĉetu de Samidano!

bordo, kun siaj vergo kaj ŝnuro en la mano; la kanono ŝajnis kompreni, kaj kvazaŭ antaŭvidante ruzajon, forkuris. La viro, timinda, sekvis ĝin.

Similaj okazoj ne povas longe daŭri. La kanono kvazaŭ diris al si subite: "Nu! Decas ĉesigi tion!" Kaj ĝi haltis. Oni antaŭvidis la finiĝon de l' batalo. La kanono, kvazaŭ ripozante, ŝajnis havi aŭ reale havis, ĉar por ĉiuj ĝi estis vivantaĵo, sovaĝan antaŭmediton. Subite, fulme, ĝi sin ĵetis sur la kanoniston. La kanonisto flankeniĝis, lasis al ĝi preterkuri, kaj vokis laŭte ridante: "Ĝis denove!" La kanono, kvazaŭ koleriĝinta, rompis babordan kanonon; poste pelita de la nevidebla ĵetilo, kiu ĝin regis, ĝi ruliĝis dekstren sur la homon, kiu sin forŝovis. Tri kanonoj estis detruitaj de la terura puŝego; tiam, kvazaŭ blinda kaj senkonscia, ĝi deturnis sin de la homo, ruliĝis de antaŭe al malantaŭe kaj malfermis breĉon en la ŝipantaŭan parion. La viro rifuĝis apud la ŝtuparo, je kelke da paŝoj de la maljuna atestanto. La kanonisto tenis sian handsipkan vergon preta. La kanono ŝajnis lin ekvidi kaj sen turniĝo retroiris sur la homon kun subiteco de hakilbato. La homo premita al la bordo estis perdota. La tuta ŝipanaro eligis krion.

Sed la maljuna, ĝis tiam senmova, pasaĝero, sin ĵetis, mem pli rapida, ol tiuj sovaĝaj rapidecoj. Li estis kaptinta linajon de falsaj asignatoj, kaj kun risko de dispremo, alŝulis ilin inter la radojn de l' kanono. Tiun decidan kaj danĝeran movan ne efektivigus kun pli da ĝusteco kaj rapido viro hardita de ĉiuj ekzercoj priskribitaj en la verko de Durosels pri la Manovro de la Mara Kanono.

La ligaĵo efikis kiel ŝtopilo. Ŝtone-to haltigas blokon, arba branĉo devojigas lavangon. La kanonisto siavice profitante tiun timindan okazon, almetis sian feran vergon inter la radiojn de posta rado. La kanono haltis.

Ĝi pendis. La viro, per levilmovo de sia vergo, ŝancelis ĝin. La peza maso renversiĝis kun bruo de teren-falanta sonorilego, kaj la homo rapida, gutante de ŝvito, ligis la glitantan knoton de la droso al bronza kolo de l' faligita monstro.

Soldatoj kaj maristoj batis la manojn.

Ĉiuj ŝipanoj venis kun ŝnuroj kaj ĉenoj, kaj en unu momento la kanono estis alligita.

La kanonisto salutis la pasaĝeron.

—Sinjoro,—li diris,—vi savis al mi la vivon.

La maljunulo estis repreninta sian kvietan teniĝon kaj tute ne respondis.

(Daŭrigota).

El franca lingvo tradukis Marian Sola (El "Kataluna Esperantisto.")

LA KVINA . . . PASKO 1925.

La sekretario por la venonta Aŭstralazia Esperanta Kongreso raportas, ke la komitato jam petis, ke la samideanoj klopodu havigi monhelpon por aranĝi kongresajn aferojn.

Kelkaj tuj respondis jene: Samideano, 20/-; s-rino P, 21/-; F. A. W. Thomas, 5/-; Al ĉiuj dankojn!

La komitato projektas la sekvantajn erojn: Elmontro pri Esperanto kaj radio-telefonio. Elmontro de Esperantaĵoj el ĉiuj landoj.

Samideanoj, kiuj instruas geknabojn Esperante, bonvolu tion sciigi al la sekretario. Oni proponas pulikan elmontron, por montri la kontentigan progreson faritan de niaj geinfanoj.

Ĉiuj bonvole notu la adreson de la honora kongresa sekretario, s-ro R. Rawson, 212 Swanston str., Melbourne; kaj la honora kasisto s-ro H. Byatt, 62 Northcote Rd., Armadale.

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Ĝis la 27a majo ni ricevis la jenajn sumojn: H. Conwell, 4/6, majo '25; s-rino Wilson, 4/6, majo '25; "A.N.A. Esperanta Gru-

PHILLIP ISLAND

"Redcliffs," Newhaven.

The Ideal Tourist Resort.

6 hrs. from Melb. by boat and rail.

Accommodation for 50 Guests.

First Class Table.

Good Piano, Spacious Bathrooms, Croquet Lawn, Tennis Court, Good Boating, Fishing, Swimming and Shooting. Picnic Parties Arranged. Esperanto Spoken in the House.

E. S. BIGELOW, "Redcliffs," NEWHAVEN, PHILLIP ISLAND.

po," Oakleigh, 2/9; W. Pople, 4/6, marto '25; P. Predl, 4/6, majo '25; E. A. Turner, 5/-, januaro '25; G. W. Rees, 7/3, marto '25; N. Counsel, 5/-, marto '25; H. Tonkins, 5/-, marto '25; F. Simon, 5/6; P. L. McCabe, 4/6, aprilo '25; M. R. Cederman, 10/-, junio '26; M. Ahang, 6/6, oktobro '24; G. Snowdon, 4/6, aprilo '25; kontantaj, 6/8.

LETERO AL AMIKO EN EUROPO.

Estimata amiko,

Kun granda plezuro mi legis vian leteron, en kiu vi petis min priskribi Aŭstralion la insulegon de la suda duonsfero; tute ne eble estas fari tion en letero, sed mi povas skribi pri kelkaj aferoj, kiuj eble interesos vin.

Aŭstralio estas kontinento, kies amplekso estas preskaŭ tiel vasta, kiel la tuta Eŭropo, sed kvankam nia lando estas tiel vasta, la loĝantaro estas rilate malmulta ĉar en la tuta insulego sin trovas iom malpli ol ses milionoj da homoj; kaj kiam oni memoras, ke en Londono sin trovas pli ol sep milionoj da homoj, oni komprenas la grandan diferencon; sed malgraŭ tio troviĝas en Aŭstralio du grandaj urboj, Sidnejo, la ĉefurbo de Nova Sudkimrujo, loĝantaro ĉirkaŭ 750,000; kaj Melburno, la ĉefurbo de Viktorio, loĝantaro ĉirkaŭ 730,000; kaj estas rimarkinda, ke tiuj ĉi urboj estas multe pli ampleksa; rilate al la nombro de la loĝantaro ol iu el la urboj en Eŭropo, ĉar en la Aŭstraliaj urboj preskaŭ ĉiu familio, loĝas en aparta domo, plej ofte ĉirkaŭata de bela ĝardeno, kaj ankaŭ estas memorinda, ke pli ol la duono de la loĝantaro de nia kontinento loĝas en la kvin ĉefurboj de la kvin ŝtatoj; kaj ke la distanco; inter tiuj ĉi ĉefurboj estas tre longaj; ekzemple, se s-ro. B., kiu loĝas en Brisbano, Kvinslando; volas vojaĝi al Perth, la ĉefurbo de Okcidenta Aŭstralio, li devas vojaĝi aŭ dekkvar tagojn per rapida vaporŝipo, aŭ ok tagojn per ekspresa vagonaro, kaj survoje li devas trapasi la ĉiujn ĉefurbojn, kaj ankaŭ estas memorinda, ke tiuj ĉi ĉefurboj estas nur novaj, kompare kun la tre malovaj urboj en Eŭropo; je la 29a de majo de tiu ĉi jaro Melburnanoj festis la datrevenon de la alveno de Johano Batman, kiu alvenis

en "Port Phillip" Golfo la dudek naŭan de majo 1835, tiel Melburno havas la aĝon de nur 89 jarojn.

La klimato estas diversa, kompreneble, pro la grandeco de la lando, sed ne tiel diversa, kiel en Eŭropo; la norda duono estas tropika, la suda duono pli agrabla, kaj pli malvarmeta, sed eĉ en la plej sudaj partoj, ni neniam vidas neĝon, krom, ĉe la pintoj de la montoj dum la vintraj monatoj; kaj nun, kiam mi elrigardas tra la fenestro, mi povas vidi multajn belajn florojn, kaj, ke la suno hele brilas, kvankam mankas nur du semajnoj ĝis la dudek unua de junio nia plej mallonga tago.

Kaj dum mi skribas pri, kion oni nomas vintro en tiu ĉi lando, tio memorigas min pri nia plej preferata sporto, futbalo: ĉiun sabatan posttagmezon dum la vintro grandaj amasoj de homoj vizitas la futbalejojn, kaj en Melburno ĉe la finaj ludoj, kiam estas decidota, kiu el la kluboj gajnos la finan batalon, tiel multe, kiel 80,000 viroj kaj virinoj ĉeestas.

La Aŭstralianoj estas sportemuloj, preskaŭ ĉiutage dum la tuta jaro, krom dimanĉe oni povas viziti kurejon, kaj veti je la preferata ĉevalo, ĉe unu el la multaj kurejoj en la antaŭurboj aŭ proksime al Melburno aŭ Sidnejo.

Nun mi finos tiun ĉi leteron, sed se plaĉas al vi, mi daŭrigos la temon en la venonta letero.

Via fidele

P. H.

ESPERANTO EN EUCLA.

Kie estas Eucla? Nia konata samideano sinjoro Aleksandro Saar klarigas:

"Eucla (jukla) estas unu el la plej izolitaj lokoj en Okcident-Aŭstralio, kaj estas sur la bordo de Granda Aŭstralia Golfo, ok mejlojn okcidente de la Sud- kaj Okcident-Aŭstralia provinclimo. La solaj konstruaĵoj tie ĉi apartenas al la telegrafista stacio, kiu estas unu el la tiel nomataj 'ripetaĵ stacioj' ĉe la transaŭstraliaj telegrafaj linioj.

"Kiam mi alvenis ĉi tien antaŭ kvin monatoj, mi ricevis surprizon plezurano. Kutime portante la verdan stelon dum la veturado, kaj alveninte Eucla-n, mi subite aŭdis ekdiron: 'Ho, verda stelo!' Poste, iu sinjorino klarigis, ke ŝi iam loĝis

un Esperantistoj, kies nomo de la nomo estis 'Verda Stelo.' Kaj tiuj estis la solaj Esperantaj vortoj, kiujn ŝi sciis.

"Iom poste mi faris parolon pri la devono kaj historio de Esperanto, kaj le rezulto estas, ke mi nun havas kvar gestudentojn por nia lingvo."

Gratulojn al la Melburna Vicprezidento de AEA, sinjoro Henriko Hyatt, kiu gajnis la diplomon de Brita Esperanto-Asocio.

RECENZOJ.

Esperanto.—Grammar and Commentary, kompilita de Major-General George Cox, B.A. (Cantab.) Kvara eldono reviziita. Ĉe British Esperanto Association, 17 Hart St., London.

La B.E.A. publikigis novan eldonon de ĉi tiu, por anglalingvanoj, tre utila libro. Laŭ eksteraĵo la grando kaj bindmaterialo tre similas al la vortaro de Millidge, kun kiu ĝi nun estas samforma volumo. La kompostado estas nove farita kaj la presisto indas gratulon por la bela aspekto kaj klara legebleco de la libro.

La ĝenerala plano de la libro restas sen ŝanĝo, do, la aldonita materialo aperas sub la sama paragrafa numero, sed kie estis necese la paragrafo plie dividiĝis.

Nova sub paragrafo donas liston de prepozicioj kaj aliaj radikoj uzitaj kiel prefiksoj.

Ke la kontrolado de la libro estis klopoda oni vidas komparante la trian eldonon par. 87 (d) -Tedita vojaĝi, mi decidis reveni hejmen,—kun la nuna eldono, sama paragrafo,—Tedita de vojaĝado, mi decidis reveni hejmen. Ankaŭ, en la frua eldono, par. 88 (c) Ĉarme, bele kaj kortuŝante estis vidi la birdon zorgantan pri sia ido—kun la nuna teksto,—Ĉarme, bele kaj kortuŝe estis vidi la birdon zorgi pri sia ido.

En paragrafo 93 estas nova rimarko pri la vortordo la tablelo de la korelativaj vortoj enhavas pli precizajn difinojn ol antaŭe por iuj vortoj.

Aldono al par. 237 (i) estas listo de ĉefaj Esperantaj verbaj radikoj kies Anglaj ekvivalentoj estas uzitaj transitive kaj ankaŭ netransitive.

Ŝajnus ke eĉ spertaj Esperantistoj trovus multon da instruo fidele komparante la du eldonojn. (C.W.B.)

Svislando kun poŝtaŭtomobila servado sur la Alpostratoj. Havebla senpage el la Esperanto Propaganda—Servo, Bern.

Ĉi tiu 48 paĝa gvidlibro, bone ilustrita, estos tre helpa al vojaĝanto en la bela lando de la Alpaj. La propaganda servo donos informon kaj kie eble aranĝos rabatitan prezon por grupo vojaĝado. Pli kaj pli ofte ni spertas, ke oni sparas monon Esperantiĝante! (C.W.B.)

GAZETOJ RICEVITAJ.

Esperanto Triumfonta, n-roj 179, 180, 181; *Volkerspiegel*, n-roj 3, 4, 5, 6; *Internacia Komercio*, n-roj 9, 10; *Progreso*, n-ro 199; *France-Esperanto*, n-roj 25; *La Espero*, n-ro 2; *Export Esperantist*, n-roj 1, 2; *Sennacieca Revuo*, n-roj 6, 7, kun literatur-scienca aldono; *Hungara Esperantisto*, n-roj 2, 3; *Informservo De La Internacia Labora Oficejo*, 48, 49, 50, 51, 53; *Konstanta Reprezentantaro De La Naciaj Societoj*, dua cikulo; *Brazila Esperantisto*, n-ro 10—12; *Itala Esperanta Revuo*, n-ro 3; *La Verda Ombro*, n-ro 2; *La Verda Lumo*, n-ro 1; *La Revuo Orienta*, jaro 4, n-ro 12, jaro 5, n-roj 1, 2, 3; *Bulgara Esperantisto*, n-roj 6, 7; *British Esperantist*, n-ro 227, 228, 229; *International Language*, n-roj 2, 3, 4; *Literaturo*, n-ro 21; *Pola Esperantisto*, n-ro 10—12; *Internacia Medicina Revuo*, 1, 2; *Arguso*, n-ro 3; *Internacia Stenografisto*, n-ro 6; *Fluganta Skribilo*, n-ro 1; *La Interligilo De L'P.T.T.*, n-ro 5; *Common-*

B.E.S.—ADRESARO

5th Edition now to hand, 1/-.

6th Edition: Register your name among the Esperantists of the world. Price, 1/-.

Australian Agent: A. R. Cohen, 224 Barker's Road, Glenferrie, Melbourne.

VITAMIN.

Nature's remedy for physical and nervous exhaustion and disorders. . .

See testimonials.

For Children and adults.

Price per packet: 3/8 posted.

Australian Agent: A. R. Cohen, 224 Barker's Road, Glenferrie, Mel-

weal, n-roj 8, 9; Eklexi, n-ro 15, kun aldono Monario, n-ro 1; Skandinava Tuthomaro, jan-feb, marto: Skandinava Esperantisto, n-ro 12.

ANONCOJ.

Sinjoro A. M. Niscenkov, poŝtkes-
to N679, Moskvo, (Rusujo) deziras
interŝanĝi I P H kaj P M kaj kores-
pondi pri la labora kaj socia deman-
do.

Sinjoro Seiici Jamada, Izumi,
Jamagata, Gifu (Japanujo), deziras
interŝanĝi PM kaj PK.

GRUPOJ FILIIĜITAJ AL A.E.A.
(Prezidanto: sinjoro W. H. King, Wel-
lington, Nov-Zelando.)

Sydney: Esperanto-Societo. Kun-
venas ĉiun ĵaŭdon de 7.30—10 p.m.
ĉe "Station House," Rawson Place
(6a etaĝo). Guste apud la ĉefsta-
cidomo. Prezidanto: S-ro. F. V. Tay-
lor; sekretario, S-ro. L. E. Fosto,
adreso. "The Brighton," Croydon
Park, Sydney.

Melburna Sekcio de A.E.A.: Vic-
prezidanto, S-ro H. Byatt; sekretario,
S-ro P. T. B. Hudson. Poŝta adreso,
Box 731, Elizabeth-str. P.O., Mel-
bourne. Kunvenejo: Hardware Cham-
bers, 350 Little Collins-str.; ven-
drede vespere, je la oka horo.

A.N.A.- Grupo, Oakleigh. Prezidanto:
sinjoro W. Quinlivan; sekretario, sin-
joro E. Chalice, poŝte adreso: Good-
str., Murrumbeena. Kunvenejo:
Mechanics' Institute, Oakleigh, lunde
vespere je la oka horo.

Berwick: Esperanta Grupo. Kunve-
nejo kaj poŝta adreso: ĉe F-ino P.
Abbott, "Chelsworth," Normanby Rd.,
Berwick, merkrede je 3.30 p.m.

Dargaville: Esperanto Societo.—
Prezidanto, S-ro Alfred Gregory.
Sekretario, S-ro R. Pope. Poŝta
adreso, P.O.; Dargaville, N.Z. Kun-
venejo: la legosalono de S-ro A. Gre-
gory, vendrede vespere, je la sepa.

"Iru Antauen"-Grupo. Prezidantino:
S-ino E. S. Bigelow. Sekretario, S-ro
J. Parker. Poŝta adreso, Warrigal

Rd., Oakleigh. Kunvenejo: 36 Kan-
garoo Rd., Oakleigh, marde vespere,
je la oka horo.

Carnegie: Esperanta Grupo. Pre-
zidanto S-ro Blundy. Sekretariino,
F-ino L. M. Irwin. Kunvenejo kaj
poŝta adreso, "Kirkcald," 10 Woorayl-
str., Murrumbeena, (du domojn for de
la Carnegie Kinema-teatro) ĵaŭde
vespere, je la oka horo.

"Malvern Girls' Club"-Grupo. Prezi-
dantino: fraŭlino N. L. Byatt. Sek-
retariino: fraŭlino A. Midsley. Kun-
venejo kaj poŝte adreso: 117 Glenfer-
rie-Road, Malvern, marde je la oka
horo.

"Nigra Cigno"-Grupo. Prezidanto
S-ro E. J. Goody, Sekretariino F-ino
F. Cherrett. Poŝta adreso, 46 Leon-
ard str., Victoria Park, W.A. Kun-
venejoj vespere je la oka horo,
"Perth Academy," komencantoj mer-
krede; progresintoj, 9 Pier-str: ĵaŭde.

**Persista Grupo, Armadale, Mel-
burno.** Prezidanto: S-ro H. Byatt,
Sekretariino: F-ino I. Thomas, Kun-
venejo kaj poŝta adreso, 62 Northcote
Rd., Armadale, merkrede vespere, je
la oka horo.

Whangarei Grupo Esperanta.—
Prezidanto, S-ro D. Tilly. Sekretario,
S-ro Chas. Waymouth. Poŝta adreso,
ĉe S-ro Chas. Waymouth, strato
Manse, Whangarei, N.Z. Kunvenejo:
La domo de S-ro Tilly, strato Water,
Whangarei, vendrede, je la oka horo
vespere.

**Raciista Esperanta kaj Diskuta
Grupo.** Prezidanto, sinjoro J. Skur-
rie: sekretariino, fraŭlino B. Adam-
son. Poŝta adreso, 673 Canning-str.,
North Carlton, Melbourne. Kunve-
nejo, Temperance Hall, Russell-str.,
Melbourne, ĵaŭde je la sepa horo.

Hobarta Esperanta Grupo. Kun-
venejo: Eaton-Bray-lernejo, Davey-
str.; ĉiun duan mardon, 7.30 vespere.
Prezidantino F-ino C. M. Hannaford.
Sekretario kaj poŝta adreso F-ino A.
Beckett, 177 Davey-str.; Hobart.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.

INTERNATIONAL CONFERENCE Re ESPERANTO IN THE SCHOOL.

MANIFESTO TO THE TEACHERS OF THE WORLD.

We educationalists of 28 countries and official delegates of 16 Governments having met in the Secretaries' Chambers of the League of Nations at Geneva, send a fraternal greeting to our fellow-workers in the task of enlightening the minds of mankind.

We assert our conviction that the cause of the present regrettable state in which the civilised world finds itself is that misunderstanding and mistrust which divide the peoples one from another.

We assert our conviction that the only certain cure for this evil is the educating of people in humanitarianism and the realisation of the principle of international fellowship for which the League of Nations stands.

We regard as one of the most valuable contributions to the solving of the problem of world reconstruction, the international auxiliary language "Esperanto," and assert our conviction that it, along with the culture languages, should become part of the national educational programme of every civilised country.

We desire to inform you of the results of our experience of the instruction of Esperanto in many schools in diverse lands.

We have proved that Esperanto is quite sufficient for practical use, as an international language for all purposes, spoken or written, for which language is needed; apart from that, it possesses remarkable qualities, which prove its value, as an educational aid.

It is valuable as a help to the exact use of one's national tongue. This is shown by an improvement in pronunciation, a better choice of words, a more precise knowledge of the real meaning of words and a clearer understanding of the principles of grammar.

Esperanto assists in the study of modern and classical languages, facilitating the task, and saving the teacher's time, in explaining grammatical forms, supplying international root words

an
th

Australasian Esperanto Association.

Minutes of Meeting of Journal Committee.

Reported that whilst many subscribers have renewed their subscription for 1921-22, a large number have failed to do so.

The cash in hand is sufficient to carry on only for three months longer, but if all the original subscribers were to bring their subscriptions up to date, we could carry on until the end of the financial year.

Resolved—(1) To send a copy of report to all subscribers.

(2) That as the journal is being run at a loss, a fund be opened and donations be received for the upkeep of our journal, which is the voice of the Australasian Esperantists.

(3) That a special effort be made to increase the circulation by securing more subscribers, and

(4) That Esperantists assist to make the journal a newsy one, by sending in any reports and items of interest.

(5) That all Esperantists be urged to rally round and support "La Suda Kruco" in every way.

A. R. COHEN,

Hon. Sec. Journal Committee,

Box 1367, G.P.O.,

Melbourne.

SUPPLEMENT TO THE "SUDA KRUCO"

ESPERANTO



The Second Language for All.

Esperanto, the simple language compiled by the late Dr. L. L. Zamenhof, of Warsaw, and first published in 1887, is the second language for people of all countries. It is a neutral language, belonging to all nations alike.

ESPERANTO IS SIMPLE.

Everybody in Europe, America and Australia can already speak some Esperanto, that is, there are many words which are the same in all languages, or in two or three or them, and all these words we find in Esperanto—like telegrafi, instituto, agrabla, modesta, simpla, historio, normale, lokomotivo, and so on. By making use of these international words, Esperanto is easy for all people to learn. It is pronounced just as it is spelled. In sound it is like Italian or Spanish.

THE GRAMMAR IS EASY.

The Grammar is short and simple. There are sixteen rules only, and there are no exceptions to any of these, nor any irregular verbs. When you have learned one word you can build up for yourself a great many others; for example: sana, healthy; sano, health; sane, healthily; sani, to be healthy; malsana, ill; sanigi, to make healthy; sanulo, a healthy person; malsanulo, a sick person; and so on. Every word in the language may be treated in the same way. The time required to learn Esperanto is only a fraction of the time necessary to learn a national language.

NO IRREGULARITIES AND NO EXCEPTIONS.

"It is almost incredible that the whole essential grammar of a language can be given in a paragraph, but it is nevertheless true. It is pretty certain that an English child could learn Esperanto in, at most, six months, so as to be able to read, speak and write it."—The late Sir William Ramsay, O.M., K.C.B.

ESPERANTO IN COMMERCE.

Business men all over the world are finding out that Esperanto is worth while. Advertisements in Esperanto reach an international public. Esperanto is so simple that the busy man of affairs can quickly learn it and be able to conduct his own foreign correspondence and negotiations. There are Esperanto delegates in 1100 towns throughout the world, and these are constantly assisting business men in extending their markets, by supplying information, and acting generally as intermediaries.

Information regarding Esperanto and instruction in the language can be obtained at any of the following groups:—

Australasian Esperanto Association, Hardware Club Chambers,
350 Little Collins Street, Melbourne; Friday, 8 p.m.

Berwick Esperanto Group, "Chelsworth," Normanby Road, Berwick; Thursday, 3 p.m.

Dargaville Esperanto Society, N.Z., C/o A. Gregory; Friday,
7 p.m.

Hobart Esperanto Group, 177 Davey Street, Hobart; Tuesday,
7 p.m.

Iru Antauen Group, 36 Kangaroo Road, Oakleigh; Tuesday, 8 p.m.
Carnegie Esperanto Group, "Kircaldy," 10 Woorayl Street,
Murrumbena; Thursday, 8 p.m.

Nigra Cigna Group, Victoria Park, West Australia; Tuesday,
8 p.m.

Persista Group, 62 Northcote Road, Armadale; Wednesday, 8 p.m.

Whangarei Esperanto Group, Whangarei, New Zealand; Friday,
8 p.m.

Belgrave Esperanto Group, "Warawing," South Belgrave.

Brisbane Esperanto Club, "Bonvenu," O'Mara Street, Lutwyche,
Brisbane.

Mont Albert Group, 10 Victoria Avenue, Surrey Hills.

La Verda Stelo Group, 16 Gordon Grove, Northcote.

South Australia Esperanto Society, 20 Henley Street, Torrensville, S.A.

Sydney Esperanto Society, W.E.A. Rooms, Station House, Rawson Place; Tuesday, 8.45 p.m.

Townsville Esperanto Society, School of Arts, Stanley Street, Townsville, Q.

W.E.A. Esperanto Group, 28 Starling Street, Lillyfield, Sydney, N.S.W.

Rationalist Esperanto Group, Temperance Hall, Russell Street, Melbourne.

LA SUDA KRUCO.

Is an eight-page paper published monthly, partly in English and partly in Esperanto. It contains particulars of the Esperanto movement in Australia, and news of its progress throughout the world. Price, 4/6 per annum. Order through any group or from Box 1367, Elizabeth Street P.O., Melbourne.

ESPERANTO BOOKS (Postage must be added to List Prices).
 The following books are obtainable from the Australasian Esperanto Association on any meeting night, or through the post, by addressing to Box 731, P.O., Elizabeth Street, Melbourne:—


TEXT BOOKS.

	s.	d.		s.	d.
Dox's Commentary and			plete)		
Grammar	4	6	La Struvelpetro	2	6
Dua Ekzercaro	0	9	La Karavano	2	0
Esperanto for All	0	3	La Vendetta	2	0
Esperanto in 50 Lessons	3	0	La Lasta	0	6
Esperanto Guide (Hyde)	2	6	La Faraono, Vols. 1, 2, 3		
Esperanto Teacher (Fryer)	1	6	(complete)	9	6
Fundamento de Esperanto	3	0	La Kantistino	1	3
Frazaro	1	6	La Fina Batalilo	2	3
German Text-Book	2	0	Lilio	3	0
Week at Esperanto	0	2½	Lastaj Tagoj de Zamenhof	1	0
Dictionaries.			La Negho	2	9
Edinburgh Pocket, Eng.-			Mimi	1	3
Esp., Esp.-Eng.	2	0	Nunttempaj Rakontoj	1	6
English-Esperanto (Fulcher			Merinda Amo	3	9
& Long)	7	6	Nigra Galero	1	6
English-Esperanto (Rhodes)	3	9	Noveletoj el la Nigra Ar-		
Esperanto-English (Mil-			baro	0	6
lidge)	7	6	Oni Ridas	1	0
Esperanto Keys (German,			Pro Kio	1	9
English, French, Italian,			Perdita kaj Retrovita	0	6
Japanese, Danish	0	3	Petro Schlemihl	1	6
German Dictionary	2	6	Serĉado por la ora ŝa-		
Literature.			flano	0	9
Aladin au la Mirinda Lampo	0	8	Svisaj Rakontoj	0	6
Arbaro Bruas	0	8	Stranza Herdaĵo	2	9
Alegorioj el la Naturo	1	0	Tri Angloj Alilande	1	3
Anekdotaro	0	6	Tra la Mondo, Pt. 1	1	3
Batalo de l'Vivo	1	3	Tra la Mondo, Pt. 2	2	0
Batalo pri Domo Heikkila	1	9	Tatterley	1	3
Blonda Ekberto	0	8	Unua Kajero	0	9
Esperantaj Prozaĵoj	3	0	Vintrofabeloj	1	3
En Svislando	3	0	Vivo de Zamenhof	3	3
Elektitaj Humoraj Rakontoj	1	0	Vortoj de Zamenhof	2	0
Fabiola	3	6	Drama.		
Funebra Parolado	1	0	Gzzes kaj lia Ringo	2	9
Forbuĉataj Popoloj	0	4	Kamena Angulo	1	3
Fundo de l'Mizero	1	6	Lia Lasta Sanco	1	0
Hebreaj Rakontoj	1	6	Makbeto	3	6
International Language	2	3	Ŝi Klinigas por Venki	1	3
menlago	1	3	Sonĝo de Someromezza Nokto	3	6
nterronpita Kanto	1	3	Nokto	3	6
nteresa Novelaro	0	6	Religious Works.		
Carlo	0	9	Himnaro	1	6
Carmen	1	6	Katolika Pregharo	2	0
Katoj en Botoj	0	2	Libro de Komuna Pregho,		
la Mizeruloj, Pt. 1-2 (com-			Pts. 1 and 2	1	6

	s.	d.		s.	d.
Migrukunmi (Katolika Pre- ĝaro)			Miscellaneous.		
Nova Testamento	2	9	Esperanto in School	0	1
Badges.			Esperanto for the League of Nations	0	1
Button, Brooch or Pendant	1	6	Esperanto, and Why We Need It	0	1
Tie-Pin	1	0	Esperanto in Commerce	0	1
Music.			Esperanto Flag	8	0
Esperantaj Kantoj la Kona- taj Arioj	0	8	Fontplumo Esperanto Self- Filling	7	6
Haleluja Koro	0	3	Facilskriba Kraĵono, Gilt	9	6
Internacia Kantaro (music and words)	2	3	Facilskriba Kraĵono, Nickel	4	0
Kvarvoĉaj Kantoj	0	9	Pros and Cons of Esperanto	0	1
La Espero (Menil)	1	0	Tuck's Post-Cards, Pkt.	6	0
La Nerenkontita	1	3			

TO THE ESPERANTISTS OF AUSTRALASIA

And Supporters of the International Language
Movement.



THE Australasian Esperanto Association is now an accomplished fact, and is resolved to make Esperanto in Australasia a recognised public utility.

Examples are frequently disclosed of waste of time and money in Commerce, Travel, and Congress due to the lack of a simple medium of **direct** communication.

It is the aim of the A.E.A. to supply this need, and convince the public that Esperanto is that medium.

To do this it is essential that this organisation be in a position to cope with any demands, and to this end the Association intends to enter upon an active campaign of propaganda, and to establish groups in country centres.

The Council is also very anxious to establish a good provision of books, and to put the library on a firm basis, so that it will be able to supply any class of literature without delay. This is important, and success depends upon it.

This move will involve a considerable expenditure in organising, printing, etc., and the Council makes this earnest appeal for the practical support of all interested. This appeal is to remain open until **28th February, 1921**, by which time it is hoped to raise at least **£100**.

The more the Association is supported, the more its success is assured, and the Council confidently appeals to all to support it as liberally as possible, and urges the filling in of the form below and sending in the first instalment now.

Make a Christmas or New Year Gift to the A.E.A., and make it as large as possible.

On behalf of the Council of the Australasian
Esperantō Association,

M. HYDE, President.

A. R. COHEN, Vice-President.

L. E. THOMSON, Hon. Secretary.

M. COHEN, Hon. Treasurer.

To the Hon. Treasurer,

Australasian Esperanto Association,

Box 731, Elizabeth Street, P.O.,
Melbourne.

I will support the SPECIAL 1921 APPEAL FUND

by donating £ : : { * Weekly
* Fortnightly until
* Monthly
28th February, 1921.

Date.....

Signed.....

Address.....

*Strike out words not suitable.

XV^a Universala Kongreso de Esperanto

Nürnberg

(2. — 8. Aŭgusto 1923)

Leter- kaj telegramadreso: Esperanto, Nürnberg.



Skribu tre legeble!

Skribu tre legeble!

ALIĜILO.

Mi subskribint(in)o aliĝas la Dekkvinan Universalan Kongreson de Esperanto kaj mendas:

..... kongresa n karto n po

Mi sendas ĉi-kune per la sumon de

Familia nomo ¹⁾ (So, Sino, Fino)

Antaŭnomo ¹⁾

Profesio ²⁾

Strato kaj numero ¹⁾

Urbo ¹⁾

Provinco ¹⁾

Lando ²⁾

Dato :

Subskribo :

..... 192.....

Mendoj ne akompanataj de la kongreskotizoj ne estas plenumataj.

Eksterlandanoj pagu nur per monbiletoj aŭ bankĉeko.

¹⁾ en nacia lingvo. ²⁾ en Esperanto.

Germanoj sendu monon nur al Esperanto, Nürnberg.

Poŝtĉeka konto nro: 26800 Nürnberg.

Vidu dorsen!

Mi deziras lui..... ĉambro.....n kun..... lito..... por..... tagoj
 kun — sen — matenmanĝo
 de unua rango — dua rango — tria rango
 en hotelo — private — en komuna loĝejo.
 Mi — ne — estas vegetaristo.
 Dato de alveno
 Mi ĉeestos la jena.....n faka.....n kunsido.....n:

Por la donaca kaso mi sendas ĉi-kune:

Por la garantia kapitalo mi notas:

Por la blindula kaso mi pagas ĉi-kune:

Kongreskotizoj.

Belgoj	30 frankoj	Nederlandanoj	10 guldenoj
Britoj	20 ŝilingoj	Norvegoj	20 kronoj
Danoj	20 kronoj	Svedoj	15 kronoj
Ĉekoslovakoj	50 kronoj	Svisoj	20 frankoj
Finnlandanoj	75 markoj	Usonanoj	4 dolaroj
Francoj	30 frankoj	Aŭstroj	} 200 germanaj markoj
Germanoj	200 markoj	Hungaroj	
Hispanoj	25 pesetoj	Poloj	
Italoj	50 liroj	Rusoj	

Ĉiu pagu en la mono de sia lando per monbileto aŭ bankĉeko.
 Samideanoj el landoj kun aliaj monunuoj ol la suprenomitaj pagu
 aŭ dolarojn aŭ ŝilingojn aŭ guldenojn aŭ svisajn frankojn aŭ petu
 pri speciala aranĝo.

Favorkotizoj por familianoj ne ekzistas.

Kiu aliĝos post la 1^a de Junio pagos plialtigon de 500/o.

Repago de kotizoj ne okazas.

La unuaj mil aliĝontoj ricevas priurban donacon.